# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo julio/aŭgusto 2012**


## DATREVENO EN JULIO

Dum tiu ĉi monato julio, Esperanto fariĝas 125-jara. Kvankam la preciza dato de apero de la Unua Libro ne estas tute certa, oni konvencie konsideras la 26-an de julio kiel la datrevenon de nia lingvo. Tial, fine de julio estas antaŭvidataj diversaj agadoj por celebri la okazaĵon kaj informi pri la lingvo.

Ideojn kaj iniciatojn por tion fari en Madrido estas bonvenaj (malgraŭ la ne tre konvena dato tie ĉi). Ĉiukaze, en Madrido plejmulto organiziĝos post la somero.

## LA URBESTRARO SUBVENCIIS NIN

Madrida Esperanto-Liceo petis subvencion komence de la jaro al la Urbestraro por projekto por la festado de la 125-a datreveno de Esperanto, kaj ni nun eksciis ke tiu instanco aprobis ĝin (se lastatempaj specialaj burokrataĵoj ne malhelpas ĝian plenumon)

Tiu projekto konsistos el ekspozicio pri Esperanto kaj celebrado de simpozio pri la valoro de Esperanto kiel interkultura fenomeno, ambaŭ aferoj farotaj en la *Centro Dotacional Integrado* de la distrikto de Arganzuela, ĝuste la sama loko kie ni faris ion tian en aprilo 2009, strato Canarias (antikva Estación Sur de Autobuses, apud la metrostacio Palos de la Frontera). En la propono ni planis munti la ekspozicion la 24an de septembro kaj fari la prelegojn la sabaton 6an de oktobro, kvankam ambaŭ datoj ankoraŭ ne estas konfirmitaj kun la Kulturejo.

Krome, ni ricevos subvencion por aĉetado de skanilo. La precizaj kvantoj estas: 250 € por la skanilo plus 507 € por elspezoj ligataj al projekto ESPERANTO125.

## ESPERANTO EN TEKNIKA KOMITATO DE ISO EN MADRIDO

Dum la lasta semajno de junio 2012 okazis en Madrido kunsido de tutmonda Teknika Komitato pri terminologio kaj aliaj lingvaj kaj enhavaj rimedoj de la Internacia Organizaĵo por Normigado (ISO), kiu okupiĝas pri diversaj temoj rilate al lingvoj, ĉefe terminologio, sed ankaŭ interalie tradukado kaj interpretado. Tiu teknika komitato (formale nomita ISO/TC 37) konsistas el dudeko da laborgrupoj, kiuj siaflanke okupiĝas pri konkretaj projektoj.

Universala Esperanto-Asocio kiel kunlaboranta organizaĵo estis invitita aktive partopreni. Tial dum tiu semajno vizitis Madridon la komisiito pri terminologio de UEA, Mélanie Maradan, kiu partoprenis dum la sesioj de la komitato.

Ŝi ankaŭ partoprenis en la jara kunveno de Infoterm, la Internacia Informejo por Terminologio vespere, la 26-an de junio. UEA fariĝis membro de Infoterm en 2011. Fondita en 1971 per kontrakto inter Unesko kaj Aŭstra Normiga Instituto (ASI), Infoterm celas interŝanĝi informojn, subteni kaj kunagadi por projektoj, renkontiĝoj, eldonaĵoj ktp, ĉefe en la kampo de terminologio.

Dum sia ĉeesto en Madrido, Mélanie kunvenis plurfoje kun la madridaj esperantistoj.

## VIZITIS NIN

Dum pluraj tagoj meze de junio vizitis Madridon la bulgara esperantistino Raja Androvska, kun sia familio, nuntempe loĝanta en Najrobo (Kenjo). La 17-an de junio, dimanĉe, pluraj esperantistoj kunvenis kun ili.

La lundon 18-a de junio vizitis la sidejon de HEF nia asturia samideano Faustino Castaño.

Dum kelkaj tagoj fine de la monato gastis en Madrido ĉilia samideano Marcos Salas.

## APERIS NOVA ESPERANTO – GRUPO

Fondiĝis formale la Grupo Esperanto – Albacete "Bonifacio Sotos Ochando" (EA–BSO), honore al Bonifacio Sotos Ochando, kiu skizis gramatikon pri Universala Lingvo en 1851 (36 jarojn antaŭ la publikigo de la "Unua Libro" pri Esperanto). La grupo estas provinca kaj apartenas volonte al EMAs kaj, do, al HEF. En sia prezentado la grupo emfazis ke estus granda ĝojo por ili kontakti kaj kunlabori kun aliaj grupoj kaj asocioj pri Esperanto.

Oni povas kontakti kun la grupo per la jenaj iloj: en Tuenti: serĉante "Esperanto Albacete". En Facebook: http://www.facebook.com/esperantoAB. En Twitter: @EsperantoAB. Ĝia blogo estas: http://esperantoalbacete.blogspot.com

## REVENO USONEN

Nia usona kolego Brandon Sowers, kiu dum pasinta jaro laboris en Madrido, post la fino de la deĵorado revenas sialanden. Dum la lastaj semajnoj li gvidis kurson de Esperanto en la anarĥiista librejo *La Malatesta*, kaj li profitis la finon de la kurso por samtempe adiaŭi la madridajn esperantistojn. La 27-an okazis festeto en la librejo kaj poste en proksima drinkejo, kun ĉeesto de pluraj samideanoj.

## MUZIKA KONCERTO

La plektr-orkestro Calle del Barquillo, kiu faris sian prezenton en esperanta medio kadre de nia 70a HEF-kongreso en San Lorenzo de El Escorial, kaj en kiu kantas nia samideano Miguel Fernández, prezentis sian muzikon dufoje dum monato junio: unue la 21an ĉe Centro Cultural Buenavista, Avenida de los Toreros, 5; la dua okazis la 23an ĉe Centro Dotacional Integral Arganzuela. Miguel partoprenis kiel kantisto en tri pecoj de la repertuaro.

## NOVAJ KURSOJ

Pedro Hernández anoncis ke li planas organizi novan kurson en Madrido, por oktobro. Se vi havas konton en FB, vi povas amikiĝi al *"Cursos Esperanto en Madrid"* en la adreso http://www.facebook.com/cursosdeesperantoenmadrid.

Por aliĝi kaj ricevi pliajn informojn: http://es.groups.yahoo.com/group/esperantovallekas/

## MADRIDA PROGRAMO

Dum la monatoj julio kaj aŭgusto, la kunvenoj de MEL okazos neregule. Tamen, plu eblos viziti la sidejon dum plejmulto de la lundoj, de la 18.30, almenaŭ julie.

La sabaton 28an de julio alvenos madriden familio Castillon (Maria, Christian kaj Nicolas) el Francio. Tujan dimanĉon ni kune ekskursos en la montaro, laŭ facila kaj agrabla itinero decidota. Ekiro je la deka per aŭtoj, reveno ĉirkaŭ la oka aŭ naŭa. Por pliaj detaloj atentu la retliston aŭ telefonu al Manolo Parra: 647 669 726.

Ankaŭ per la retlisto ni aranĝos renkontiĝon en kafejo por la sekva lundo aŭ mardo.

Pro fermo de la kafejo 4D kie disvolviĝis kutime niaj sabataj babilrondoj, neniu estis anoncita por la unua sabato. Atentu la retforumojn por ekscii pri renkontiĝoj meze de la monato.

Novaĵoj kaj informoj aperas en retlisto http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/ aŭ en la nova forumo http://esperanto.creatuforo.com/

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4ºB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7, Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ saluton@wanadoo.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com